



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 123 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. 10 Septembro 1930.

LET'S GO DUMB—

And be better understood !

A short article under the head "A Universal Language" appeared in the "Age" of 16 August. Prof. Daniel Jones, there advocating sign language as an international language medium, breaks no new ground. In "Bibliografio de Internacia Lingvo" (Geneva 1929), an attempt to classify all works written for the past 300 years on the problem of international language, one may see a list of 33 writings on sign language and similar projects, dating from 1614 to that of the recently published plea of P. Korpov (Moscow 1926) for a universal sign language. None of the theories intended to surmount the barrier of language diversity has ever received the breath of life that only usage can confer. True it is that the redskin "nations" used sign language somewhat extensively, but the primitive wriggling that sufficed for the savages' simple needs would not serve to illuminate a modern audience on bitumen road construction, or the philosophy of G. B. Shaw.

Further, a sign code (for a system of communication in which the tongue is not used should not be termed a language) would be useless for radio broadcasting and international telephony, where the need of an inter. language is ever more keenly felt. The interflow of international thought, by the printed word and the findings of that World Literature dreamed by Goethe evidently have no place in the mind of Professor Jones.

Man is a loquacious animal, and strangely susceptible to the thrill imparted by impassioned oratory. It is hard to conceive of an international gathering being moved to enthusiasm by dumb gesturing. The surge of inspiration that flushes the hearts of the assembled throngs from the earth's four

corners when "La Espero", the Esperanto anthem, is sung at the world-congresses, is no small factor in generating the Esperantist's well-known will to carry the battle abroad to the indifferent.

It would seem the counsel of despair to suggest that mankind should accept the pitiable limitation of the unfortunate speechless as a means to wider inter-comprehension. This state of mind would surely be dispelled were the well-meaning academician to abandon his attitude to Esperanto, and enter on an examination of its frankly defined claims.

KURSO PER TRADUKADO.

Kondukata de s-ro G. Gordon. F.B.E.A.,
Sek-iino: f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av.,
Surrey Hills. Melb., E.10.

TRADUKO 10

FORMORTANTA RASO

La Aŭstralia indiĝeno.

Sir Baldwin diras, ke kvankam oni ofte parole nomas (1) la indiĝenojn nigruloj aŭ "niggers", kiu ĉi lasta (10) vorto en la Angla lingvo estas vulgara nomo de la Afrikaj negroj, tamen ili ja ne estas negroj laŭ raso nek laŭ koloro, sed estas longkapaj Kaŭkazuloj. Admirinda trajto en la karaktero de la indiĝeno estas lia malavareco. Li havas le emon dividi kun siaj kunuloj sian manĝaĵon kaj kian ajn alian havaĵon. Verŝajne tiu karakteriĝo iufoje estas la kaŭzo de mortigado de la blankulaj bovoj. Pro tio, ke li kutimas dividi sian manĝaĵon kun aliaj, li ne komprenas, ke la blankulo, kiu posedas multon da bovoj, ne volas donaci el ili al la nigrulo. Krom ĉe (2) la adeptigaj ceremonioj kaj la puno je certaj (3) krimoj, la indiĝenoj kondutas inter si tre bonkore—kompreneble se nur ili estas anoj de amikaj grupoj. Sir Bald-

win Spencer diras, ke la indigenaj viroj traktas la virinojn laŭ maniero, kiun oni ne povas nomi tre severa. La virinoj devas fari grandan parton sed ne ĉiom de la laboro de la loĝejo. En bona sezono tio ne estas multa, kaj en malbona sezono la viroj kaj virinoj egale suferas, kaj da kiom troviĝas da manĝaĵo la virinoj ricevas justan porcion. La vivo de indigena virino kaj la traktado al ŝi de la viroj estas tre supera ol la sorto de miloj da virinoj en kvartalaĵoj de Britaj urboj. Tamen se viro suspektas, ke lia edzino krimis kontraŭ la leĝoj pri edzineco, tiam certe lia traktado al ŝi estas abomene kruelega. Ne estas moro de la indigenoj mortigi maljunulojn kaj kadukulojn; kontraŭe ili estas aparte (4) bonkoraj al tiaj homoj kaj donas al ili porcion el (5) la manĝaĵo, kiun tiuj ne povas mem akiri.

Treege interese en la libro estas la priskribo pri la sociaj sistemoj kaj tri-baj ritoj. Dum longa tempo Sir Baldwin ne konstatis, ke la rilatoj de indigeno al liaj parencoj tute diferencas de la rilatoj de blankulo al ĉi ties (6). kunvivado, kaj la lingvoj ne havas apartajn vortojn por patro, patrino, ĉe (2) la indigenoj ne estas familia edzo kaj edzino. Ĉe (2) civilizitaj popoloj ĉiu el la vortoj edzino, edzo kaj patrino individue nomas unu personon, sed Arunta viro nomas la edzinon Anua, kaj virino same nomas la edzon, kaj ambaŭ nomas Anua dudekojn da aliaj viroj kaj virinoj, ĉar ĝi estas nomo de grupo. Estas certaj (3) viroj el kiuj kaj sole el kiuj povas virino laŭleĝe edziniĝi, kaj estas tiel sama leĝo pri la leĝigo de viro. Ĉiuj laŭleĝaj edzinoj kaj edzoj havas saman nomon, kiel ankaŭ havas ties patro kaj patrino, se ĉi tiuj (7,8) laŭleĝe geedziĝis. La grupa, ne individua, parenceco estas karakteriza de preskaŭ ĉiuj el la Aŭstraliaj triboj. La elpensado de tiuj leĝoj, kiuj estas tre komplikaj, atestas pri inteligento neniel (9) malalta. Eble la originala celo estis gardi kontraŭ interparenca pariĝo. (daŭrigota).

NOTARO 10.

1. Rimarku konstruon de la frazo por eviti kunmetitan tempon.—2. "ĉe," in the case of.—3. "certaj" aŭ "iuj." Ling. Resp. pĝ. 54.—4. "aparte." Notaro 9/8. 5. Neniam uzu "la" post "da." L.R. pĝ. 72.—6. "ĉi ties," the latter's.—7. "ĉi tiuj," the latter.—8. Zam. diras, ke uzi intervortan streketon ĉe "tiu ĉi" aŭ "ĉi tiu" estas erare. L.R. pĝ. 54.—9. "neniel" aŭ "tute ne."—10. "kiu ĉi lasta," which latter.

KRONIKO.

Perth, W.A.—Dum kelksemajna tempo nia interamikiga komitato vigle klopodis aranĝi festvesperon. Lastan jaŭdon ni ja ĝuis rezulton de ĝia entuziasma laboro.

Nia prezidanto trafvorte bonvengis la gastojn; proksimume 50 ĉeestis. S-ro Saar sukcese gvidis aferojn. Ĉiu gasto portis sprite verkitan titolon de bone konata libro. Tial ni rapide konatigis unu la alian, dum ĉiu ĉerbstreĉis diveni la titolojn.

S-ino Phillips, f-inoj Gibson, Byatt, s-ro Sainsbury kantis, kaj s-ro Phillips plaĉe ludis la violonon. F-ino Griffin bone deklamis "La Franco kaj la ratoj." F-inoj Miller kaj Byatt ludis unuaktan komedion "Don't jump at conclusions." S-roj Clydesdale kaj Casey prezentis kelkajn ŝercajn deklamojn Esperantajn. F-ino B. Miller bonvoĉe legis "Du Fratinoj," kaj s-ro Saar tradukis angle.

La tute afero kontentegige sukcesis; post noktomanĝo, provizita de la sinjorinoj, la ĝojriĉa vespero finigis per kanto de l' Espero.

Ankoraŭ nia Societo progresas. Ni akceptis afablan inviton de la ĉefastronomo, viziti la ĉitiean observejon. Pasiĝis instruplena vespero, dum kiu la anaro teleskope rigardis multajn stelojn belajn. Nuntempe la koncerna komitato sin okupas, por aranĝi festvesperon en la klubĉambro, dum la venonta monato.

Vizitis nin ŝipestro Claxton de la plej suda marbordurbo, Albany. Ni kore lin bonvenigis. Dum Septembro okazos, ĉe Perth-o, ekzamenoj por la D.B.E.A. kaj la Prepara Atesto.

Wellington, Novzelando.—Kun pli ol 50 da financaj membroj, la loka klubo bone floras, plejparte pro energia laboro de la kluboficistoj. Jene traduko de unu el la ordinaraĵ klubraportoj, kiuj aperas regule en la taggazetoj ĉi-tieaj por regali samideanojn kaj interesigi varbotojn:—

La ĉiusemajna kunveno de la Wellington'a Esperanto-Klubo okazis je mardvespero (12.8.30) en la Y.M.C.A., s-ro E. C. Jack, prezidis. Instruklasoj okupis la unuan parton de la vespero, post kiam plezurdonata programo prezentigis.

F-ino C. Smythson parolis en Esp-o pri "La Besta Regno," kaj s-ino H. M. Steffens sekvis kun legado "Kion Janko fariis."

Originala monologo en Esp-o, "La Negocisto diktas Leteron" estis prezentita de la klubsekretario, s-ro B. Potts. F-ino K. M. Steffens legis en

Esp-o pri "Bona Konsilo," post kiu la kasisto, s-ro L. E. Dust, paroladis al la klubo je la temo "La Astronoma Signifo de la Luno," desegnante surnigra-tabulajn diagramojn.

Unu-scena komedio originala "Serĉante Loĝdomon" estis prezentita en Esp-o de f-inoj E. Duguid, G. Carty, kaj K. M. Steffens.

La komedio estis sekvata de plua unu-scena komedio, "La Domo de Shakespere." F-ino C. Smythson, s-ro Dust kaj s-ro Potts estis la roluloj.

La finaj programoj konsistis el parolado en Esp-o de s-ro Jack'je "La Bildo," kaj klarigo de la sekretario pri "Certaj Punktoj de Elparolado."

Por la unuafojo jam de kelkaj jaroj aperis en la Wellington'aj taggazetoj mallonga kablogramo pri la 22a Universala Kongreso ĉe Oksfordo. Kvan-kam nur maldetala, la raporteto estis sufiĉa por elvoki multe da publika intereso.

Khandallah, N.Z. — La starigo de novo klaso ĉe Khandallah, apud Wellington, pli fortigas la Esp-movadon en Novzelando. Anstataŭ kvin, ses grupoj aŭ kluboj nun laboras.

La unua kunveno de la klaso, kiu konsistas plejparte el geknaboj, okazis je la 30a de Julio, kiam s-ro W. King, NZEA sekretario, kun s-ro W. McGuigan, vizitis nian lokon por helpi rilate al komencaj taskoj.

Malgraŭ neagrabla vetero, ĉeestis 15 personoj; post kelkaj vortoj, s-ro King kaj McGuigan donis la unuan lecionon, je kio la geklasanoj montris entuziasmon.

La klaso kunvenos ĉiun merkredon, kaj s-ro J. Sneddon kaj M. Ravelich ĉin gvidos. Ties penado portu sukceson!

Melbourne, Vict.—Invitite al kunveno de la Melb. Esp. Societo je 29a de Julio, f-ino E. A. Sinnotte, kiu antaŭ ne longe revenis de vizito al Japanujo, afable konsentis paroli pri spertoj tie. Tre ĉarme ŝi rakontis kiel amike akceptis ŝin la japanaj gesamideanoj, kaj kiel bone ili regalas ŝin dum restado tie. Tre interesa estis la priskribo pri vizito al la Kiboŝa Eldonejo, pri la belaj ĉerizfloroj, la rekonstruitaj modernaj urboj, kiujn ŝi esploris, kaj la ĉefaj famlokoj. F-ino Sinnotte montris al la anoj kelkajn pentritaĵn menuojn, memoraĵojn de la japana ŝipo, kaj disdonis japanajn gazetojn.

Je la 12a de Aŭgusto, s-ro C. Ballard faris paroladon pri angla verkisto, George Borrow, kiu naskiĝis en la jaro 1803. La Borrow familio estis malriĉa, sed spite de la malfacilaĵoj li profitis je ĉiu okazo eduki la talentojn, kiujn li posedis, kaj, ĉe lernejo, loĝado en Kim-

rujo, kaj vojaĝoj en aliaj landoj, li lernis la latinan, grekan, francan, kimeran, germanan, hispanan, danan, kaj italan lingvojn. Pro amikiĝo kun la ciganoj li ankaŭ lernis ilian lingvon. En la jaro 1840 li edziĝis, kaj post vojaĝoj en Hispanujo li verkis (1843) la bonekonatan libron "La Biblio en Hispanujo." En la jaro 1851 eldoniĝis la aŭtobiografia romano "Lavengro" kaj poste "Romany Rye" kaj aliaj. Pro tiuj verkaĵoj li sufiĉe riĉiĝis kaj ne plu maltrankviliĝis pro vivrimedoj.

Je la 19a de Aŭgusto, s-ro P. Hudson plue parolis pri sia vojaĝo. Li denove vizitis Rangoon, kaj, antaŭ ol lia foriro, li promenis en la belega publika ĝardeno, vera paradizo. Ankaŭ la zoologia ĝardeno estas vidinda. La sinjoro montris ekzempleron de la cigaroj, per fabrikado de kiuj okupas sin la virinoj. Alveninte en Georgetown en Penang, li loĝis en la luksa A. & O. hotelo. Estas sidloko por proksimume 2 mil manĝantoj en la vasta mangoĉambro, kiu donas vidon sur belan ĝardenon apud la marbordo. Duono de la loĝantaro estas hinoj, kiuj estas tre riĉaj pro kulturado de kaŭĉuko, kaj korrĉado en muskatoj, kariofiloj, k.t.p. Post kvartaga restado en Penang li veturis al la kontinento ĝis Ipoh, ĉefurbo en Perak, kie oni kreskigas rizon, kaŭĉukon, kaj kokosajn palmojn. Li vizitis ankaŭ la stan-minejojn. Troviĝas en la distrikto kavoĵ el kalkŝtono, kiujn la hinoj uzas kiel temploj. Ipoh estas malgranda, tamen bela urbo, kaj la pli bonajn kaj luksajn domojn posedas la hinoj.

Brisbane (Kvinslando).—La societo havis du bonajn festojn: en Ashgrove la 22 junio, kaj en Zillmere la 20 julio. Dum la festo en Ashgrove pluvigis, afero neofta en nia vintro, kaj la festantoj pasigis ceteron de la tago en la hejmo de gastama samideano sinjoro N. Mills. La feston en Zillmere partoprenis 23 personoj; la vicprezidanto, sinjoro C. Kidd, sindone disponigis al la anoj sian hejmon; oni multe babilis en Esperanto.

Parolo pri Esperanta poezio, kun legado de specimenoj, estis farita la 8 julio de nia prezidanto, sinjoro Hyde.

Nia sekretario, fraŭlino Carrick, afable gastigis la anojn en sia hejmo la 4 julio, kie ili plezure renkontis s-ron M. Dobrilla, el Melbourne, kiu nun loĝas en Brisbano. Oni havis agrablan vesperon per ludoj kaj babilado, en Esperanto kaj aliaj lingvoj.

La 22 julio s-ro F. Simon faris parolon en la societejo pri bezono reorganizi nian movadon, kaj pli efike aplikadi niajn fortojn. Precipe s-ro Simon akcentis tion, ke antaŭ ĉio ni

devas plene posedi nian lingvon; sen bona scio de nia lingvo ni ne estas veraj Esperantistoj, sed nur senutila balasto ĉe la movado.

La societo malfermis novan kurson kun 12 lernantoj, kies progreso estas ĝis nun tute kuraĝiga. La kurson gvidas nia malnova samideano, sinjoro Sycamore, al kiu estas eble denove partopreni aktive nian agadon.

Sidnejo.—Je la 31a Julio, la S.E.K. monata festvespero okazis, kiam oni dancis kaj partoprenis en vortludoj. Ĉeestis kelkaj alilandaj vizitantoj, el Finnlando, Rusujo kaj Latvio, kiuj interesiĝis pri la internacia lingvo, kaj je la proksima kunveno de la Societo estis tre kontentige vidi, ke ĉiuj ĉeestas kurson por komencantoj, kiujn gvidas s-ro L. Thomson, per rektmetodo de instruado.

F-ino F. Smith, s-roj Winter kaj Worrall, membroj de S.E.K., sukcesis ĉe la ekzameno por la diplomo de la B.E.A. Gratulojn.

NEKROLOGO.

Kavaliro Robert Stout, P.C.

La morto de ankoraŭ unu el la tri patronoj de la Novzelanda Esperanto-Asocio, nome, Kavaliro Roberto Stout, P.C., okazis la 19an de Julio—nur de-kunu tagoj post la morto de Kavaliro Jozefo Ward, eks-ĉefministro kaj ankaŭ patrono de NZEA.

Kavaliro Roberto Stout travivis okdekse jarojn kaj estis unu el la plej bone konataj kaj saĝaj Novzelandaj ŝtatistoj kaj advokatoj. Krom bone servi la landon tiusfere, li interesiĝis kaj agis sur kelkaj aliaj kampoj, notinde magistrato kaj universitato. La nacia konferenco de Esperantistoj, okazigita ĉe Wellington, N.Z., en Januaro 1929, elektis lin patrono, kiun oficon li afable akceptis. Kvankam li ne prenis aktivan parton en la disvastigado de Esperanto, li helpis la NZEA'n ĉu donece, ĉu nome. Scion de Esperanto li ja posedis; tralegi Esperantajn gazetojn ĉiufoje donis al li grandan plezuron.

Ĉiuj sekcioj el la socio funebriis la forpason de famega kaj eminenta sinjoro, sed tion faris precipe Novzelandaj samideanoj, kiuj ja perdis ankoraŭ alian amikon.

"A WIFE BY PROXY."

Esp. translation in book form.

"Heroldo de Esperanto" announce publication of "Anstataŭa Edzino" (A Wife by Proxy) in book form. The prices are 3/- and 4/6 for soft and hard covers. Order through A.E.A.

ESPERANTO KAJ KULTURO.

Jen traduko de "Das Esperanto ein Kulturfaktor." de prof-o R. Trogel verkita por klarigi al "kleruloj inter la malestimantoj de Esp." pri la vivanteco de Esp-o kaj la vera celo de ties misio.

En la enkonduko li trafe atentigas la germanan sciencistaron pri jama vastuzado inter la franca, angla, kaj precipe la japana grandiamularo, kiu tute ne konsideras dignon-ofenda lernon de la helplingvo. Ekzistas feliĉe germanaj esceptoj. Tri ĉefaj elirpunktoj de la malamika atako estas (1) la artefariteco, sekve "nevivipovo" de Esp-o, kaj la "mondlingva destino" de l' angla. (2) la Esp-ista "popolecaĉo, minacanta la germanan naciecan senton." (3) la "maltaŭgeco de Esp-o por ia kulturcelo."

Sur teoria kampo Schuchardt, Baudouin de Courtenay kaj Jespersen jam plene pruvis la unuan malvera. Malgraŭ evidenta vivpulsanta Esp-o, modernaj Don Kihotoj ne vidas, ke la de ili kondamnita lingvo evoluas vivece, "scnas per plimulte da langoj ol kelka idiom de malgranda tribo, kies rajto pri honora titolo de lingvo estas por ili ekster ĉiu dubo." Vorto "artefarita" signifas malsame ĉe la por- kaj kontraŭ-esperantaj partioj. E-tistoj tute ne neas tiun "artefaritecon," sed per arteca lingvo ni komprenas "artverkaĵon, kiu leviĝas kiel vortfariĝinta logiko super ĉiujn naturkaŭzitajn popollingvojn." Zamenhof estas lingvokreinto samsence kiel Luther kaj Dante. "Kiu asertas, ke Esp-o estas senanima, tiu neniam spertis la efikon de la emocia fakto, kiu prezentigas en la Biblio kiel pentekosta miraklo. Povas nei la miraklon nur tiu, kiu staras ekster la kulturunio, kiun prezentas jam la lingvanaro de Esp-o." La aŭtoro pledas uzon de la "sola ĝusta nomo: internacia neutrala helplingvo."

La duan aserton, nome, ke Esperant(ism)o celas starigon de ia supernacieco, kaj ŝablonigon de la homaro, la aŭtoro refutas kun scienco verkita 2a ĉapitro. Volante per plipreciza lingvaĵo faciligi la esplordemandon, li plendas la intermiksion de ideoj raso, popolo, ŝtato; kaj postulas precizajn difinojn. La ideoj nacieco kaj internacieco ne estas malakordigeblaj; li citas subtene por tio germanajn intelektulojn, kiaj Goethe, Herder ĝis Naumann. Li skizas evoluon de la germana popoleca sento, celante pravi, ke nur "per opaj popoloj, kiuj ja devas esti diversaj, montriĝas la homaro," kaj atentigas pri tio, ke oni prezentas en popolece nacia Germanujo pli da fremdaj ol enlandaj

verkoj. Tiu ĉapitro forte malkredigas pri taŭgeco de l' angla lingvo okupi rolon de internacia. "Tute senkaŭza estas la timo, ke Esp-o malutiligas la germanan lingvon kaj ties prestiĝon. Se ĉiu fremda lingvo efektive estas la esprimo de fremda popolspirito, ĉi tiu danĝero minacas plikredeble por la naciaj lingvoj ol per tiu, kiu estas konscie elpensita kaj efektivigita de sia kreinto kiel neŭtrala lingvo."

Tria aserto, ke Esp-o nur indas roli maksimume kiel helpa signaro, netaŭga por kulturcelo. La tiu-ĉapitra refuto, cetere brila, ŝajnas ne tre ĝuste respondi la demandojn, kaj povus esti kunfandita en la unuan sektion.

Bone tradukita de J. Schroder. Prezo 1 ŝil. (kvar resp. kuponoj) ĉe "Heroldo de Esp.", Koln.—(Robo).

VERA SERPENTA ANEKDOTO.

La "Guardian" (Bowraville, N.S.K.) citas jenan :

"Ni ofte aŭdas, ke serpentoj tre ŝatas lakton, kaj ankaŭ, ke oni ilin povas logi al morto per subtao da lakto metita apud iliaj truoj aŭ kaŝejoj. Sed verŝajne oni neniam aŭdis pri pli rimarkinda ago de serpento tiurilate, ol tiu, kiu okazis ĉe la färmbienno de s-ro Usher de Bowraville antaŭ kelke da tagoj.

S-ro Usher estis melkanta, kaj fininte melki la bovinojn jam en la melkejo, iris eksteren, por enpeli la ceterajn. Tiam li ekvidis grandan nigran serpenton, kiu sin alŝiksis sur mampinto de unu bovino. Malgraŭ tio, la bovino, ankoraŭ remaĉis kontente, kvazaŭ neniel ĝenata de la okazo, kaj jen sur ŝia mampinto pendis tiu mortiga reptilio !

S-ro Usher reeniris la melkejon, kaj, haviginte al si bastonon, iris ataki la serpenton, kiu forglitis. Li tamen sukcesis ĝin mortigi, kaj, disbatinte la korpon, vidis la lakton ensuĉitan de la reptilio disfluigantan surteren."

La gazeto aldonas: "Ni povas garanti la veremon de s-ro Usher—kaj li ne drinkas."—(trad. Godoko).

Public Library, Hobart, and "La Suda KrucO."

Mr. K. Simmons, of the State Taxation Department, Hobart, informs us that the authorities of the above library have consented to receive the "S.K." as a donation.

We sincerely thank Mr. Simmons for his generosity and good service in forwarding so effectively the interest of our paper and of the Esperanto movement generally.

REMITTING MONEY.

Would subscribers kindly remember always to make money orders, postal notes or cheques payable to R. Banham. Thank you.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ni sincere dankas al ĉiu sube nomita pro fidela reabono kaj sindona helpo al nia amata gazeto dum ĉi-nuna tempo, por multaj el niaj batalistoj sufiĉe malfacila porvivkondiĉe.

F-ino D. Black, 5/-, julio, '31; D. Hitchcock, 5/-, junio, '31; f-ino C. Hanaford, 4/6, junio, '31; s-ro Dewar kaj Masterton Grupanonco, 4/6, 5/6, julio kaj aprilo, '31; J. Girdwood, 4/6, junio, '31; s-ino M. Purnell, 4/6, junio, '31; s-ino Sainsbury (vendo), 2/-; H. Pudney, 30/- anonco, aŭg., '31; K. Simmons (por Hobart biblioteko), 4/6, aŭg., '31; E. Cox, 4/6, junio, '31; f-ino D. Bell, 4/6, julio, '31; H. Love, 4/6, junio, '31; N. Gaye, 5/-, sept., '31; D. Munro, 5/- donaco kaj 5/-, sept., '31; f-ino E. Anderson, 9/-, nov., '31; G. Bird, 9/-, aŭg., '31; A. Serpell, 18/-, sept., '34; S. Udjur, 10/-, aprilo, '30; N. Thomas, 5/-, julio, '30; s-ino F. Tondut, 4/6, junio, '31; f-ino E. Sinnotte, 10/-, dec., '31; R. Fitzgerald, 4/6, sept., '31.

ELTERIGO DE INDIGENA ĈEFO.

Ĉe Dubbo (N.S.K.) oni elterigis skeleton de indigena ĉefo eble enterigitan antaŭ ducent jaroj. En sia vivo la ĉefo devis havi admirindan korpoformon. La krur- kaj femurostoj estis colojn pli longaj ol tiuj de ordinara homo. Kiam la indigeno paŝis la teron, ties alto tre verŝajne estis sep futoj, kaj lia granda eminenteco estas konstatabla el tio, ke oni lin enterigis dek futojn profunde. Pro tio, ke la kranio havas fendon ĉe unu flanko, oni rajtas aserti, ke li falis mortfrapite en batalo. Verŝajne la malsupra makzelosto estis rompita, sed la dentaro perfekte konservata, kvankam glatiĝinta pro uzado, kio elmontras, ke ilia posedinto mortante estis homo mezaĝa. Oni akiris por surmontro ĉe ambulancaj klasoj tiujn ostojn, kiuj ne polvigis pro tempopaso, kaj kiuj ĝuste kunfortikigite faras preskaŭ perfektan specimennon de skeleto.—(Trad. Godoko.)

ERARO EN U.E.A. JARLIBRO.

Ni altiras atenton de ĉiuj al eraraj linioj en la ĵus eldonita jarlibro. La Suda KrucO estas ne suplemento al "Inter. Lang.", kaj havas ne du sed ok paĝojn. La eraro estis kaŭzita pro tio, ke certa nia nuliga letero atingis la U.E.A.-an oficejon tro malfrue. Ni petas afablan represon ĉe frataj gazetoj.

ADAPTOJ DE ANGLAJ PROVERBOJ.

A cat would fain fish eat, but she is loth to wet her feet.

Kato manĝi fiŝojn volus, se ĝi seka kapti povus.

Don't cut off your nose to spite your face.

Ne detranĉu la nazon por puni vizaĝon.

A stitch in time saves nine.

Unu kudrero ĝustatempe farita, naŭ-
obla laboro antaŭŝparita.

One man can lead a horse to water, but ten cannot make it drink.

Al akvo unu homo povas bruton venigi, dek homoj ne povas ĝin trinki devigi.—(G.go).

BATTLING IN BABEL.

Translators of French literary works are rarely above suspicion, says Mr. Arnold Bennett: "The majority of English translations from the French demonstrate two things about the translators. First, that they do not really understand French, and particularly French idioms and proverbial phrases. Second that they cannot write English."

Says Mr. R. Richie, M.A., in his "Translation from French": "The official English translation of the Allied Note answering Germany's first offer of peace in 1917 renders "pretendu" by "pretended," where it clearly means, as generally, "alleged." Such absurdities have been so rife throughout the war, that the future historian who describes the state of education in this country at the present time will scarcely be able to compliment our journalists and public officials on their knowledge of French." The same writer gives many examples of the prevalence of inaccuracy in newspaper "translation", due in great part to the deceptive similarity between French and English and bewails the general lack of good models, although "French works have been translated into English since the Norman Conquest."

PRI MALLONGIGOJ.

S-ro Skurrie lastatempe tiris atenton ĉe la societoj sur la artikoleton "Abbreviations" en aŭgusta Suda Kruc, kaj esprimas malaprobon pri kreskanta emo de eŭropaj Esperantaj gazetartikolistoj uzadi mallongigitajn formojn. Per tio, li asertis, tiuj homoj tre ofte elmetas neklare verkitajn tekstojn malfacile legeblajn, precipe por legantoj. Li ankaŭ konsilis simplecon kaj pli fidelan imiton al la modeloj donitaj de la Majstro. La societo sen-
tis al la redaktoro leteron, per kiu ili kolektive kondamnas la mallongigadon.

(Rimarko de la redaktoro: Rilate la stilan simplecon li kore aldonas al la opinio de l' estimataj samideanoj-societanoj la sian tute saman; al tiu pri la mallongigoj li ne absolute povas aldoni propran kondamnon. Ĉu li devas kompreni, ke la societanoj senesceptante ne volas ian mallongaĵon (s-ro. k.t.p., ekz.,)? Ja verege la redaktoro ĉiel kontraŭas vastiĝon de la ruseca kutimaĉo detranĉi radikpartojn el fundamentaj vortoj. Tia fi-
agado estas rekta malfidelo kontraŭ la brava konservantaro nialingva, jam forpasinta de surtero. Ĝi estas krome danĝera enrompo en la sanktan fundamenton, unu fojo por ĉiam metitan de la amita majstro. Sed ĉu ne vere, ke kelkaj trebonaj lernolibroj (ekzemple, "First Steps," Butler lasta eldono) enhavas liston de tre vaste uzataj mallongigoj, facile kompreneblaj por ĉiu iom progresinta? La tradukistoj de belverkoj ne hezitas uzi interalie "rim. de l' red"; ili ne pensas, ke tia formo aŭ simila eĉ iomete makulas la paĝon. Zamenhof ekuzetis mallongigojn jam en 1888. Sekvus lian ekzemplon ankaŭ la redaktoro, inklina al tia modera uzado de tempo- kaj spacoŝpara mallongigado, almenaŭ en la leterskribo kaj en porprogresintaj gazetoj. Tamen, respekte je l' voles-
primo de legatoj, aperos surpaĝe de "La S.K." neniam plendinde diskutbla vorttranĉaĵo.)

WIESBADEN.

From s-ro L. Jstel, Universal Esperanto Association delegate at Wiesbaden, Germany, since 1908, there comes to us

PERCY HOLMES ELEKTRISTO KAJ RADIISTO. 212 NOONE-STR., CLIFTON HILL.

Prezentas al vi novan radi-aparaton. La "VERDASTELO" maŝino estas spectale konstruita por la Esperantistaro, kaj estas havebla laŭ diversaj ampleksoj, kiuj entenas de du ĝis ses valvoj. Aŭskultu ĝin en propra hejmo via!

MEMORU—POR ĈIO ELEKTRA.

Telefonu: JW 4017.

surely one of the most beautiful and artistically produced guides ever issued in Esperanto. In immaculate text we are shown over this thermal paradise whereto resort for healing those of the world's ailing whose bank accounts are not.

Not only is Wiesbaden world-famed for its baths, but also for its huge State theatre, Museum, Casino, parks and sport-centres. The photographic reproduction of these places is excellent.

This is the fourth guide booklet issued in Esperanto by the Wiesbaden Traffic Office, which, it would seem, is convinced by results of the value of the interlanguage as a means of reaching the non-German world with its particular message. The publication may be had free on request from L. Jstel, Wiesbaden, Wilhelmstr 1/1.

ARTIFICIALITY AGAIN.

In a recent letter to the "Morning Post", London, Professor A. H. Sayce calls up that old bogey, artificiality. "The attempt to create one (an international language) artificially is like an attempt to create an orange blossom artificially; not only is the scent wanting, but the living individuality as well. It is either a new language to be added to the multitude already existing, or a mere list of arbitrary signs, like the signs of algebra."

The metaphor is good; but there is another equally good. Technically the rose is an artificial flower, but its scent, colour and beauty are everywhere admired; and while we are not quite clear what "a living individuality" means, we do not doubt the rose has this as well.

Professor Sayce would have us adopt a national language, preferably "literary English, or a simplified form of it," and refers to the neutral tongue as "a mere list of arbitrary signs." He overlooks the fact that even the most refined and "literary" English would be "a mere list of arbitrary signs" if it were not daily employed for the purposes of a people. It is use which transforms the "signs" into a vigorous, sensitive language; and Esperanto has been in such

daily use for forty years. It has been used for all the purposes of man, from cataloguing to love-making, and by him has been given life.

The reference to "a new language to be added to the multitude already existing" is so beside the point as to be beyond comment.

—"International Language."

ESPERANTO WORKS!

(1) In the "Pola Esperantisto" for June, Aleksy Lasinski tells the world how Esperanto enabled him to bridge the language gulf. He recently translated the "Memoirs" of Biesiedowski, which task called for a footnote concerning a certain ex-deputy of the Albanian parliament. Failing to find in Polish any information on the point, he addressed himself to the delegate of the Universal Esperanto Association in the village of Tirane, Albania, one Cuk Sirroni. An answering letter gave him all the light he wanted.

(2) M. Blassberg, a Polish doctor of medicine, sent his Japanese friend, Dr. Nishi, in Tokio, an Esperanto translation of the Polish novel "Marta" (Orzeszko). Sometime afterwards he was informed by the recipient that the famous work in which Orzeszko describes the impoverishment and degradation of the unfortunate Marta is now purchasable in a Japanese translation, made from the Esperanto of Zamenhof, and that it finds many readers among the womenfolk.

Furthermore, a cinema company has undertaken to film the story, under the title "Look on this Woman", in which, it is said, Irie-Takako, one of the most popular Japanese film stars, will be cast as Marta.

These instances are only two of many such that could be culled from the pages of the hundred or so gazettes that chronicle Esperanto's world-wide activity.

LIBROJ RECENZOTAJ.

Du Majstraj Noveloj. Theodor Storm. Trad. H. Heitmüller. Heroldo de Es-

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiginto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

Specialisto pri Fontanplumo

noveco. Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco iĥ kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

peranto, Koln, 252p. Broŝ. 2.40 Germ. Mk.; Bindita 4.

La Mortado, parolado de d-ro H. Nothnagel. Trad. B. Selzer. Unu Germ. Mk. Esperanto Societo "Progreso", x Ettenreichgasse 4/31, Wien.

Juneco kaj Amo. Originalo de Ed. Payson. Esperanto Pub. Co. 1/6.

Esperanto por Infanoj. Gladstone Solomon. Sama eldonejo. 1/6.

Viktimoj (dua eld.) Julio Baghy. 4/-, 5/-, 6/6, ĉe BEA. La Junulino el Stornhyr, de Selma Lagerlof, trad. O. Frode. Eldona Soc. Esperanta, Stockholm. 1½ sveda kr. Broŝuro de L. Sinha, eld. de sama.

CIES SERVANTO— NENIES SKLAVO !

„Heroldo de Esperanto“, la super-nacia, superpartia ĉiusemajna ĵurnalo de Esperantujo, aperas jam dek jarojn, regule kiel horloĝo, en granda formato, kun bonaj informoj pri la Esperanto-movado kaj el ĉiuj sferoj de la tutmonda vivo. Bonstila redaktita, riĉe ilustrita. Sendependa de iu ajn organizacio, sed servanta al la tuta movado. Petu senpagan specimennon, kune kun senpaga riĉenhava „Katalogo de Libroj“ !

**Administracio de Heroldo de
Esperanto
Koln, Brusseler Strasse 94,
Germanujo.**

Full collection of S.K.

Messrs. George Gordon of Christchurch, and N. Gaye of Ascot Vale, Melb., have informed us that they have the S.K. from No. 1. Doubtless there are several other foundation subscribers who have conserved every number of our little organ.

LETTER LOST !

We are sorry to inform the unknown correspondent who placed a missive addressed to "Editor S.K." in the letter box of Miss Blyth, Surrey Hills, that it has been lost. Would the sender kindly get into touch with her at once.

TUTMONDA KOLEKTANTO.

Organo por filatelo kaj interŝanĝado de objektoj.

Specimenan numeron sendas senpage:

**A. Prackaz, Jablonne n. Orl.
Ĉeĥoslovakujo.**

KORESPONDO.

Rinino, fininte la rusan ĵuran fakul-

taton de univ. de Harbin, petas aŭstralian plumamikon. S-ino Chaza Sun, Pochtova str. 55, kv 27, Uĝol Dumska, Harbin, North China.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu mardo je la 7.30a horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FB.E.A. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.